



Karaj,

Mallonge pri kvar temoj du horojn antaŭ ol celi flughavenon. La nordhemisfera somero liveras amason da edukaj eventoj.

AMO-4

La 13-an julie komenciĝis la kurso de la Internacia Somera Lernejo de Esperanto en Tiefo-templo de la urbo Xi'an (Siano), ĉefurbo de Shannxi-provinco, nordokcidenta Ĉinio. Antaŭ du jaroj la Landa Sekcio de ILEI en Ĉinio kaj la Xi'an-a E-Asocio ekkazigis la someran lernejon por kulturaj e-istojn dum someraj ferioj en la lando. Ĉi-jare la lernejo kun 14 lernantoj el Nepalo, Koreio kaj de Taiwan, Xi'an kaj aliaj lokoj de Ĉinio havas du-nivelajn kursojn, nome bazan kurson kaj perfertigan kurson gvidataj de Miaohui, veterana e-isto.



La 12-an de julio Wang Tianyi, prezidanto de IKEF (la faka asocio de UEA pri Komercio) kaj de Xi'an-a E-Asocio kaj lia kolego Wei Shan, vicprezidanto de Xi'an-a E-Asocio vizitis la Tiefo-templon por saluti la kursanojn. La kursoj daŭros kvin semajnojn kaj en ties lasta semajno okazos la tria Seminario pri Aktivula Maturigo (AMO).

Raportis:
Wei Shan kaj Chen Ji.

Kurso 'Esperanto Etape' finfine progresetas

Pro laborsemajnfinaĵoj, la cellova retkurso de ILEI (subtenata de UEA) progresis, kaj rigardeblas ĉe <www.ilei-mondo.info> kun libera aliro sen pasporto. Nun estas kvar livermanieroj, por almenaŭ kelkaj etapoj. Mem provu! Jen kio haveblas:

- 1) Bildoj kaj tekstoj tuje videblaj en la retpaĝaro.
- 2) Serioj da malgrandaj bildoj, konvenaj por zipa elŝuto kaj vidigo en poŝtelefonoj ks.
- 3) Lumbildaj prezentoj en formato PPS, pretigitaj de Pierre Lemarchand.
- 4) La samaj enhavoj en formato PDF (du variaĵoj), kune kun vortlistoj kaj solvoj al ekzercoj.

SES en Nitra – ĝojplene, sukcese

Jam plurfoje ĉi tiu etosplena kaj juneca aranĝo altiras centojn da homoj al Slovakio, por ke lernintoj ĉe <lernu.net> spertu la vivantan lingvon. Unuafoje ĉi-jare, la aranĝo multobligas sin kun sesio en Rusio, kaj planoj pri aliaj kontinentoj.

Jen modelo por UEA.

Jen la popolo, kiun devus celi ne nur TEJO, sed ankaŭ UEA.



Postdiplomaj kursoj en Pollando urĝe bezonas pli da kursanoj

UEA aktive informadis pri tiuj kursaroj kaj la ligitaj stipendiaj ebloj, kaj oni kompilis solidan liston de interesiĝantoj. Sed tiuj ne transformiĝas en sufiĉa kvanto, por ke la kursa eko estu sekurigita. Ni refoje alvokas por pli da aliĝoj – precipe el landoj pli proksimaj al Pollando. UEA kaj ESF reengaĝas sin por altigi la nombron, kaj petegas al Landaj kaj Fakaj Asocioj aktive konigi la studprogramon kaj varbi studentojn (eble subvenciantaj ilian partoprenon). Jen jamaj kursanoj.



La kursaro estas unika kaj tro valora por facilanime perdiĝi al ni – nur pro manko de sufiĉa interveno!